


La 23an de februaro 2015

Laboristoj en la Nuklea Centralo n-ro 1

Multiĝas akcidentoj



La 19an de januaro unu laboristo falis de la akvujo kaj mortis en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima kaj, la 20an de januaro, alia laboristo en la nuklea centralo n-ro 2 mortis, premate de maŝino. En 2014, ĝis la fino de novembro, 40 laboristoj vundiĝis. Tiu cifero estas trioble pli granda ol en la lasta jaro.

Nun en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima laboras 6000 homoj ĉiun tagon. Mankas ne nur laborforto sed ankaŭ laborkvalito. Iu laboristo jene diras: “Ja mankas laboristoj, sed same grava estas manko de spertaj laboristoj. Jam forlasis plejparto de la spertaj laboristoj, kiuj laboris de antaŭ la akcidento, ĉar ili elmetiĝis pli ol la normo. Nun la politiko de TEPCO estas, ke ni finu la donitan laboron plej rapide kaj plej malmultekoste. Ĝia profitcentra politiko kaŭzas akcidentojn.

Severa laboro en la nukleaj centraloj

Mi tradukos artikolon aperintan en la ĵurnalo Fukuŝima Minjuu la 11an de decembro 2014:

“Mi estas senfamilia, do mi povas vivteni min, sed se mi havus

familianojn, estus malfacile manĝigi ilin”, diris 50-jara viro, kiu laboras en la nuklea centralo n-ro 1 jam tri jarojn. Antaŭe li okupiĝis pri forĵetado de rubaĵoj kaj konstruado de akvujoj por poluita akvo, sed nun li transportas poluitan akvon kolektiĝintan sub la reaktordomoj. Lia salajro estas 200 000 enoj monate.



Radioaktiveco en la centralo estas ankoraŭ tiel forta, ke li surportas ŝirmveston kaj maskon, kiu kovras la tutan kapon. Li estas tiel peze ŝirmata, ke li ne povas moviĝi facile, tial laboro de unu horo kaj duono estas la limo de lia forto, tamen pro la proceduro por en- kaj eliri la centralon kaj pro la preparado, li ekveturas de sia apartamento en la urbo Iŭaki 40 kilometrojn for de la centralo je la 5a horo matene kaj revenas hejmen nur vespere. Li dividas sian ĉambron kun kelkaj homoj. Li aĉetas kaj manĝas jampretajn manĝaĵojn en oportuna vendejo por tri manĝoj. Li fojfoje distras sin per *paĉinko*, pingloludo.

Dum la pasinta monato li elmetiĝis al 1,8 milisivertoj da radioaktiveco. Estas laŭleĝe permesite al laboristoj elmetiĝi maksimume al 50 milisivertoj jare, tamen multaj kompanioj havas sian propran normon kiel 20 milisivertojn, tial se li laboros kaj elmetiĝos en tiu ritmo, li devos forlasi la laborejon post unu jaro. “Mi sentas, ke la publiko ekperdis intereson pri la nuklea akcidento, sed certe multiĝos pli danĝeraj laboroj en la reaktordomoj. Mi esperas, ke oni sciu tiun fakton”.

(Fino de la traduko)

Timo pro malsaniĝo

TEPCO enketis al 4587 laboristoj en la nuklea centralo n-ro 1 en aŭgusto kaj septembro 2014.

2003 laboristoj (43,7%) havas timon pro la laboro en la centralo, kaj la plej granda timo estis ebla malsaniĝo pro radioaktiveco.

La ministerio publikigis, ke laboristoj en la centraloj havas pli da risko pri urinvezika kancero, pulma kancero kaj faringa kancero, kiam ili elmetiĝas al pli ol 100 milisivertoj.

Tamen strange estas ke Nuklea Reguligada Aŭtoritato planas plialtigi la maksimuman normon de elmetiĝo de laboristoj de 100 milisivertoj al 250 milisivertoj. La estro diris: “La internacia normo estas 250 ~ 500 milisivertoj jare, sed ju pli malgranda estas elmetiĝkvanto, des pli bone. Se okazos samnivela akcidento kiel en Fukuŝima, laboristoj povos okupiĝi pri la riparado kun elmetiĝo de 250 milisivertoj maksimume.

Eble temas pri grava akcidento, sed TEPCO kaj aliaj kompanioj profitos tiun ŝanĝon por pli severe laborigi laboristojn.

Multiĝo de poluitaj rubaĵoj

Nun oni komencis forĵeti la 4 reaktorojn en la nuklea centralo n-ro 1. Ĉiuj rubaĵoj, ekzemple betonaj pecoj el la detruitaj reaktordomoj kaj hakitaj arboj por fari spacon por la akvujoj, estas forte radioaktivaj. Oni ne rajtas transporti ilin eksteren, do ĉiuj rubaĵoj akumuliĝas en la tereno. TEPCO antaŭvidas, ke ĝie 2027 ekestos 560 000 tunojn da poluitaj rubaĵoj. Jam ekestis 200 000 tunojn da rubaĵoj, kiuj okupas 60% de la kapacito de la konservejo.

Laboristoj en la centraloj surportas kaskon, ŝirmveston, gantojn kaj aliajn. Oni reuzas kaskojn, maskojn kaj ŝuojn, sed forĵetas aliajn vestaĵojn. Oni metas tiujn vestaĵojn en grandajn kestojn kaj faras montetojn el ili en 8 lokoj en la tereno. TEPCO planas bruligi ilin kaj malgrandigi la kvanton, sed ne sukcesos fari tion, ĉar pli kaj pli multiĝas laboristoj.

Tankaoj de 53-jara laboristo en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima

Pro duoblaj kaŭĉukaj gantoj
miaj fingroj ne moviĝas facile

Mi pene kaj pacience
turnas ŝraŭbon.

Mi laboras en la loko,
kie mi ne povas iri al necesejo.
Malagrabla estas pormaljunula vindaĵo
ĉe miaj sidvangoj.

Akvujoj plenaj de poluita akvo
staras kiel grandaj arboj.
Inter tiuj mi sentas,
kvazaŭ mi sufokiĝus.

Kompanioj inter TEPCO kaj la mia
suĉas mian salajron.
Poluita akvo malmultiĝu
samkiel mia salajro.